

Дмитрий Николаевич Садовников,  
Volga, Volga (Stenjka Rasin)

*tradukita de Kristian Langgaard*

De malantaŭ la insulo  
sur la ondoj de l' river'  
iras ŝipoj multkoloraj,  
flirtas flagoj en aer'.

Sur l' antaŭa Stenjka Razin;  
festas la edziĝon li  
al princino el Persujo  
en varmega amebri'.

Sed la viroj murmuregas:  
"Tute li forgesis nin.  
Nin virino anstataŭos.  
Li fariĝis mem virin'"

Tiun mokon aŭdas Stenjka,  
la terura ataman'.  
Ĉirkaŭbrakas la persinon  
li per sia forta man'.

Li la nigrajn brovojn sulkas  
Fulmotondro estas li.  
En okuloj liaj estas  
nun videbla sangebri'.

"Nu fordonu, mi trezoron  
la plej belan de l' amant'!"  
sonas lia tondrovoĉo  
trans la ondojn al la strand'.

La princino mortpaliĝas  
(Timo estas en l' okul')  
kaj silente aŭdas jenaĵn  
vortojn de la terurul':

"Volga, Volga, patrineto!  
Volga, via estu ŝi!  
Ne antaŭe Don-kozakoj  
donis tian-ĉi al vi!

...

Inter liberuloj estu  
 - Volga, Volga, patrinet'  
 nek malpaco nek batalo!  
 Tial - jen la virinet'!"

Kaj li ĵetas la persinon  
 (la plej karan sur la ter')  
 en la bluan profundaĵon,  
 kaj ŝin glutas la river'.

"Nun agordu balalajkojn!  
 Ludi, danci volas ni!  
 Estu gajaj, kamaradoj  
 je la belmemor' pri ŝi!"

Jen dum kanto, danco, ludo  
 sur la ondoj de l' river'  
 iras ŝipoj multkoloraj,  
 flirtas flagoj en aer'.

*Traduko de la Rusa poeto "Из-за острова на стрежень (Стенька Разин)" de ДМИТРИЙ НИКОЛАЕВИЧ САДОВНИКОВ (Dmitrij Nikolajevič Sadownikow, \*1847 – †1883) en Esperanton de KRISTIAN LANGGAARD (\*1894 – †1957).*

*Arg-478-1036 (2010-03-08 21:19:37)*

*Mi, Manfred Retzlaff, prenis tiun ĉi esperantigon el la reta kolekto "<http://www.esperantonia.dk>". kiun kunmetis s-ro Lars Kromann (Stenbrydervej 6, Værløse, DK4640 Fakse, Danio, [lars.kromann@mail.dk](mailto:lars.kromann@mail.dk)). Vidu la retejon <http://www.esperantonia.dk/volga.htm>. Kristian Langgaard estis dana Esperantista verkisto kaj Esperanto-instruisto. Vidu ekzemple: <http://www.esperantonia.dk/lingvaj.htm>. Pri lia vivo kaj verko vidu ankaŭ la artikolon <http://www.esperantonia.dk/bio-langgaard.htm>.*